

Pri la sesdekjara disko de Mihály Sárossy

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-744/118, 1983 novembro 24, 26

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-118/SRI-118-1-744-1983-11-24-26-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pri-la-sesdekjara-disko-de-Mihaly-Sarossy.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ĉiuj scias la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto arigis iom pli ol kvin mil personojn. Laŭ la nombro de la partoprenantoj la Budapeŝta UK 1983 staras en la unua vico. La duan lokon okupas la 15-a Universala Kongreso okazinta en 1923 en la germana urbo Nürnberg. Antaŭ ekzakte sesdek jaroj tiu UK kunvenigis preskaŭ kvin mil homojn, por esti tute precize: kvar mil naŭ cent ses dek tri kongresanojn.

A.- Laŭ la kritikisto d-ro Walter Lippmann, tiu poliglota juristo al kiu ni ŝuldas la fundamentan libron "Lingvaj Respondoj de D-ro Zamenhof", unu el la ĉefeventoj de la 15-a Universala Kongreso en Nürnberg estis la "teatra vespero de Literatura Mondo", kiun oni ankaŭ nomis la "Kabaredo de Literatura Mondo". Ni citu kelkajn erojn el lia raporto aperinta en la revuo ESPERANTO, aŭgusto-septembro 1923:

Cl.- "Ĉu Esperanto estas lingvo vivanta? Nur nesciantoj kaj malbonvoluloj povas tion neigi. Ke ĝi estas lingvo senpere donanta esprimon al ĉio, kio emocias la homon, ke ĝi estas lingvo - kiel ĉiu natura - rekte iranta de koro al koro, tion mi spertis neniam tiom forte, kiom en la Kabaredo, kiun dum la kongreso okazigis redaktantoj kaj kunlaborantoj de la bonega Budapeŝt-a gazeto "Literatura Mondo". (fino de la citaĵo).

A.- Bele ĉu ne, la jaron de la 68-a UK en Budapeŝto, memorigi, ke antaŭ sesdek jaroj la tute juna revuo LITERATURA MONDO eldonita en Budapeŝto, spertigis al la esperantistoj arigitaj en Nürnberg, kiom vigle natura povas esti la artefarita lingvo de Zamenhof. Kiel eĥo el tiu impresiga Kabaredo de Literatura Mondo ekzistas la du diskoj de la hungara populara kantisto Mihály Sárossy. En la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds estas konservata unu el tiuj valoregaj diskoj, kies titolo estas "En la drinkejo". Ni provos aŭdigi al vi la unuan flankon de tiu ĉi sesdekjara disko kaj malgraŭ la skrapoj vi komprenos, kial la aŭskultantoj estis tiel impresitaj. Kante, elparole, ritme, orkestre kaj ankaŭ tekste, ĉio en tiu ĉi kanzono estas plenumata, kiel cetere la aliaj eroj el la Kabaredo, kiujn organizis kaj grandparte vigligis Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay.

Cl.- Aŭdu la kanzoniston Mihály Sárossy:
En la drinkejo (1) (3'06'')

A.- En sia raporto pri la Kabaredo de Literatura Mondo, d-ro Walter Lippmann skribas pri la kanzonisto:

Cl.- Apud Kalocsay kaj Baghy staris kiel komponisto kaj kantisto kun sia voĉo admirinde plene klara la juneca Sárossy.

A.- En la aŭgusta numero de Literatura Mondo, 1923, sub la titolo "Post la dekkvina" aperis tre bela kaj komplete citinda raporto pri tiu Literatura kaj Kabareda Vespero. Tre interesa foto

montras la ok aktorojn de la Teatra Trupeto de Literatura Mondo. La kantisto Mihály Sáróssy estis vestita kiel klaŭno aŭ amuzisto. El tiu raporto de Literatura Mondo ni citu kelkajn frazojn:

Cl.- "Rilate al la teatraj prezentadoj de Literatura Mondo ni povas, sen fanfarono, raporti pri vera sukceso... Ĉi tiun sukceson ni ne atribuas al ni mem, nek al la interna valoro de nia programo. La aplaŭdojn gajnis por ni la Lingvo, kiu deskuinte la katenojn de la diletantismo, devis montri tiujn mirindajn vivfortojn, kiuj sin kaŝas en ĝi. Iom malica rideto de milda ironio; korŝiraj sonoj de patrina doloro; subtila sentimentaleco de moderna kanzono; naiva sed forta voĉo de l' kamparo; artifika frosttremigo de l' ruzefarita teruro, melankoliaj rebriloj de l' romantika revemo; ekstaza patoso de l' vundita animo; pikanta ĉarmo de petola fabelo; spiritaj transkapiĝoj de l' plej kurioza ŝerco, jen la plej diversaj kolornuancoj, en kiuj nia Diamanto povis briligi siajn facetojn.

A.- Por reeĥi al tiu raporto jen ni aŭdigas al vi la komencon de la dua flanko de la disko de Mihály Sáróssy:

En la drinkejo (2) (3'07'')

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond aŭdigis al vi la sesdekjaran diskon de la hungara kanzonisto Mihály Sáróssy, membro de la Teatra Trupeto de Literatura Mondo. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2013